



INTERNACIA FERVOJISTO

1996 • 6



Fervoja antologio

Kadre de sia 50a jubilea kongreso, okazonta en la urbo Aalborg 16a-22a de majo 1998 IFEF alvokas ĉies kunlaboron cele al publikigo de eta antologio rilatanta al fervojo.

Povas temi pri

1. Originala verko, eventuale jam publikigita.
2. Traduko el kiu ajn lingvo, eventuale jam publikigita.

La longeco prefere ne preterpasu kvin paĝojn.

Se eble, la aŭtoroj sendu sian kontribuon ankaŭ sur disketo (programoj: WordPerfect por Windows, Winword aŭ en ASCII-formo.

Limdato: 31a de oktobro 1997.

La kontribuoj bonvolu sendi al la IFEF-sekretario:

D-ro Romano Bolognesi,
Via Misa 4, IT-40139 Bologna.

Se vi konas indan verkon aŭ verkeron laŭ la supre indikita longeco, kaj ne povas mem traduki, bonvolu same signali ĝin al la supra adreso.

Aparta komisiono selektos la verkojn laŭ literatura kaj faka niveloj.

Por tradukaĵoj bonvolu nepre aldoni la originalon kun ĉiuj bibliografiaj indikoj, kaj se la verko jam aperis, lokon kaj daton de la publikigo.

IFEF

Al ĉiuj landaj asocioj: Bv nepre legi paĝon 95 pri uniformprezentado dum la 49a IFK

Frontpaĝo: Fakkunsido de fervojistoj dum la 1a Azia Kongreso de Esperanto kaj jarkunsido de Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio (vidu referaĵon p.93).

Sidante de maldekstre: la dua: s-ro Han Zuwu, la tria: s-ro Heinz Schindler, la kvina: s-ro Li Sen, la sesa: s-ro Nobuki Naosuke kaj la sepa: s-ro Sibata Akira

Enhavo

Fervoja antologio	82	Jubilea jarkunveno de GEFA	92
49a IFK	83	Aziaj fervojistoj kunsidis en Shanghai	93
Protokolo <i>Movadaj aferoj</i>	84	Estrara kunveno de IFEF	93
Resuma jarraporto (daŭrigo)	84	FISAIC:	
Miliardaj investoj por ICE-linio	87	Invito al Film- kaj Videokonkurso	94
Resumoj de fakprelegoj	88	Forpaso	94
Grandrapidaj problemoj en Nederlando	89	Esperanto-parto	
Tunelo sub aŭtoŝosea krucejo	90	de urba muzeo en Česká Třebová	95
75jariĝo	90	Uniformprezentado dum la 49a IFK	95
Du vizitoj en sudorienta Eŭropo	91	Ĉirkaŭ la teron 2500foje	96

49a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) 10a-17a de majo 1997 KOŠICE, Slovakio



Adreso: Ing. Magdaléna FEIFIČOVÁ
A. Bernoláka 25/5, SK-01001 Žilina
Bankkonto: 40934040/7500, SWIFT: CEKOSKBX
ZIL ČSOB, Legionárska 1,
SK-01001 Žilina
Ing. Magdaléna FEIFIČOVÁ,
A. Bernoláka 25/5, SK-01001 Žilina
Poŝtkonto: 064274-0014240-005/6500, Poštová
banka, P.O.Box B-113, SK-01203-Žilina
Ing. Magdaléna FEIFIČOVÁ,
A. Bernoláka 25/5, SK-01001 Žilina
Kongresejo: Dom umenia (Domo de Arto) kaj hotelo
SLOVAN

lom pri kongresaj ekskursoj

Ĉar la organizantoj volis eviti grandan amasiĝon da homoj en unu loko, ili decidis doni ĉiam du celojn por la ekskursoj. Tiel kaj por tutaga, kaj por duontaga ekskursoj oni devas elekti el inter du ekskursceloj laŭ sia bontrovo. La tuttagaj ekskursoj inkluzivas tagmanĝon, la duontagaj refreŝiĝon.

Tuttaga ekskurso al Bardejov kaj banloko Bardejovské kúpele

La urbo Bardejov ricevis en la jaro 1986 Eŭropan Premion – oran medalon de UNESCO pro prizorgado de kulturaj memorigaĵoj. La vizitantoj povas admiri unikan komplekson de historia urbokerno kun amaso da valoraj arthistoriaj konstruaĵoj kaj bone konservitan defendan fortikaĵon. Perlo de la placo estas gotika preĝejo de St. Egidio el la 14a jarcento kun 11 gotikaj al-taroj, kaj gotike renesanca urbodomo.

Apuda banloko Bardejovské kúpele havas ok fontojn kun unikaj alkalecaj-salaj ferenhavantaj mineralakvoj satigitaj per CO₂. Loka muzeo de popola arkitekturo alproksimigas al la vizitantoj la plej ofte uzitajn tipojn de loĝdomoj, kelkajn specojn da religiaj kaj teknikaj konstruaĵoj, sed precipe vivstilon en ĉi regiono de Karpata Arko.

Tuttaga ekskurso al kastelo Krásna Hôrka kaj Ochtninská aragonita groto

La gotikdevena kastelo Krásna Hôrka [Krasna Huorka] el la 14a jarcento estas interalie inte-

resa pro belega malfrue renesanca kapeleto kun nature mumiigita korpo de Sofio, edzino de kastelsinjoro Štefano Andráši la Unua.

Aragonita groto Ochtniná [Ohtina] estas kreita de atmosfera akvo, kiu per sia agado formis en marmore grizbluaj kaj alabastre blankaj muroj potsimilajn kavojn, el kiuj elkreskas unikaj belegaj aragonitaj florornamajoj kaj blankaj kristaloj. Ĝi apartenas al la plej valoraj grotoj en Eŭropo. Al vizitantoj estas alireblaj 300 metroj el ĝia tuta 1525 metra longeco.

Duontaga ekskurso: veturado per vapora trajno ĉe Košice

Per historia trajno, kiun tiros vaporlokomotivo nomata Katka, priservata antaŭe fare de anoj de iama infana pionira organizaĵo, oni veturos al Čermel' [Čermelj]-valo, ne nur por admiri interesan teknikajn, sed ankaŭ por ĝui refreŝiĝon (ne nur per aero) en arbara parko.

Duontaga ekskurso: vizito al Muzeo de Vino en Prešov

En kultura, merkata kaj industria centro de regiono Spiš [Spiš], en urbo Prešov [Prešov], estas interesa ne nur historia urbokerno, sed ankaŭ unika muzeo de vinoj, kiu troviĝas en keloj sub la urbodomo. Tie oni ekscios multajn interesaĵojn ne nur pri prilaboro de vinberoj, sed ankaŭ pri servado kaj ĝuado de fina rezulto – vino.

□

Protokolo de la kunveno 'Movadaj aferoj' en la 48a IFEF-kongreso en Hago (NL) - 16.05.1996.

La Sk Bolognesi bonvenigas la multajn partoprenantojn (64 el 17 landoj) kaj rapide klarigas la celojn de la kunveno, kiu jam de jaroj intencas libere diskutigi traktante ne fakajn temojn, sed ĝeneralajn primovadajn temojn, ĝuste por interŝanĝi spertojn kaj doni/ricevi la plej lastajn utilajn informojn, en la espero utiligi ilin en la propra agado.

S-ino Mila Horst-Kolinska (PL) prezentas 'Mazi en Gondolando'-n kaj proponas viziton al la IEI. (Internacia Esperanto-Instituto).

K-go Jan Niemann (DK) informas ke DEFA provos novan reklamilon entenantante 'La plej bona Esperanto-travivaĵo' de la DEFA-membroj. Oni planas preson kaj varbadon, iom provoke kaj intime.

K-go Martin Stuppig (AT) multe subtenas la projekton 'Mazi' kaj krome anoncas la organizadon de la 'Trilanda Pinto', septembron 1996, 3taga aranĝo en Arnoldstein dum kiu okazos la Jarkunveno de AFEF.

K-go Joachim Giessner (DE) aludas al la fakaj prelegetoj kaj konsilas pri la necesaj paŝoj por atingi bonan kvalitan kaj aktualecan nivelon tiucele.

K-go Alberto Menabene (IT) prezentas libron de li verkitan, itallingve 'Sekso kaj religio' en kiu rolas ankaŭ la lingva problemo en la Eŭropa Unio. Pri tio li anoncas iniciaton per kiu samideanoj de ĝemelitaj urboj en IT, FR kaj DE povos tradukante kontribui por starigo de politika 'Eŭropa Parlamenta Grupo' kunlige kun ĵurnalo en la urbo Terracina (IT).

K-go Ernst Glättli (CH) parolas pri kelkaj

strategioj varbi inter el la ĝejunuloj. SAEF provis sin turni al la CH-fervojoj por havi la adresojn de la plej junaj dungitoj, sed ĝi ricevis rifuzon. Li laŭdas la kurson 'Mazi' kaj mencias pri ekspozicio en Loten farita de la CH-sekcio de FISAIC. Li varme rekomendas ĉiam kaj ĉie uzi Esperanton por vekti interesajn demandojn kaj doni klarigojn.

Sk Bolognesi mencias pri iniciato en Bologna, kie la loka sekcio de FISAIC organizis verkan konkurson de fabeloj por la geknaboj de la fervojistoj, por kiuj la Esperanto-Grupo decidis prepari aldone bildstrian biografion de Zamenhof en la intenco envolvi la plej scivolemajn el ili.

S-ino Mila Horst-Kolinska revenas al alia projekto pri 'Mazi', kiu devos esti alimaniere aranĝita speciale por TV-dissendado, ĉar televidioj estas interesitaj pri tio. Kiuj deziras kunlabori b.v. sin turni al IEI.

Inĝ. Zdeněk Polák (CZ) raportas pri interesa instruado ĉe instituto.

H.Pr. Giessner rememoras ke ankaŭ nia Terminaro estas bona propagandilo, nun aĉetebbla je bonega prezo. Ekzistas CD-ROM kaj eblas libroj 2-3lingvaj.

La deziro ĉeesti kaj la emo partopreni en la diskutado montras la grandan intereson pri ĝeneralaj propagandaj temoj. Sed la tempo rapide flugas kaj la kunordiganto devas fermi la kunvenon.

Bologna, 29.06.1995.

Protokolis: Sk Romano BOLOGNESI

Resuma jarraporto de la landaj asocioj pri la jaro 1995

(daŭrigo)

8. Junularo

16 landaj asocioj raportas pri ĝejunuloj. Tiuj landoj havas 240 ĝejunulojn (14% de la membraro de IFEF). La plej granda evoluo estas en Hungario, kie la penado donis frukton, ĉar tie jam estas 60 ĝejunuloj inter la fervojistaj esperantistoj. Bedaŭrinde nur kelkaj estas IFEF-anoj.

Nur en Ĉinio troveblas du ĵunulgrupoj kaj

en Rumanio unu memstara ĵunulgrupo. Bedaŭrinde Aŭstrio, Germanio, Japanio, Nederlando kaj Svislando ne havas ĝejunulojn, Danio kaj Kroatio havas nur po unu, Slovakio nur du ĝejunulojn. Multaj landaj asocioj daŭre varbas kaj agitas, sed ankoraŭ ne sukcesis kreskigi la nombrojn de ĝejunuloj. Ĉiujare mi skribis en la jarraporto tiujn vortojn, sed pri rezulto mi ne povas

raporti. Mi ĉiam diris kaj diras, ke bedaŭrinde maljuniĝas la fervojista Esperanto-movado, ni ne povas certigi novan generacion por daŭrigi la laboron, la kontinuecon. Denove mi diras eĉ krias: nia ĉefa tasko estu serĉi kaj varbi ĝejunulojn, fari propagandon por Esperanto, kaj aranĝi allogajn, malmultekostajn kongresojn, renkontigojn kaj interesajn programojn por ĝejunuloj.

9. Terminara kaj traduka laboro

Laŭ la raportoj nur 13 landaj asocioj laboras sur la tereno de terminara kaj traduka laboro. Nur en Germanio, Hungario, Italio kaj Jugoslavio la nacilingva terminaro estas preta, presita kaj eldonita.

La pola, ĉeĥa kaj slovaka nacilingvaj terminaroj jam estas tradukitaj, sed pro manko de mono ĝis nun oni ne sukcesis presigi ilin.

La Hungaraj Ŝtatformoj transprenis la produktadon de la libroformaj terminaroj en la kadro de UIC. Pro tio eblas mendi ĉiun ajn dulingvan version inter du el tiuj lingvoj, kiuj jam estas tradukitaj kaj troviĝas en la sistemo RailLexic. Ĝis nun en tiu sistemo troviĝas jenaj lingvoj: Esperanto, angla, franca, germana, hispana, hungara, itala, nederlanda, pola, portugala, slovaka kaj sveda. Laŭ tiu ebleco jam estas preta la franca-Esperanto kaj Esperanto-franca terminaro, kaj la germana-Esperanto kaj Esperanto-germana terminaro laŭ LG-V.

Niaj aktualaj taskoj estas:

- reviziado de la tradukoj de ĉ. 1200 novaj esprimoj por LG-VI;
- kompilo kaj eldono de Naciaj Vortaroj;
- kolekto de novaj esprimoj por Aktuala Vortaro, sendi ilin al UIC (sed tio estas tasko de UIC RailLex-grupo, ni fervojistaj esperantistoj nur helpas al la grupo);
- traduko de la Difina Vortaro (sed la tradukon de difinoj mi supozas fari tiam, kiam ni havas tempon por tio, ĉar tiun laboron mi taksas grava, sed ne urĝa).

La landaj asocioj efike laboris kaj laboras por tiuj celoj.

10. Ekonomio

Ekzamenante la asociajn kasojn pri 1995

en Bulgario, Danio, Francio, Germanio, Italio, Hispanio, Hungario, Jugoslavio, Nederlando kaj Norvegio la ekonomia situacio de la landa asocio estas relative kontentiga. Tiun rezulton akiris tiuj landaj asocioj pro apogo de fervojo, FISAIC-sekcio aŭ aliaj organizaĵoj.

En kelkaj landoj, ĉefe en iamaj socialismaj landoj la ekonomia situacio estas malbona, ĉar la fervojistaj esperantistoj ricevas malmulte da apogo aŭ neniu. Kelkaj landoj per donacoj povas esti vivkapablaj.

11. Fervojistaj tranoktejoj kaj feriaj domoj

En Aŭstrio, Ĉeĥio, Ĉinio, Italio, Hungario, Japanio, Norvegio, Pollando, Rumanio, Slovakio kaj Slovenio ekzistas fervojistaj tranoktejoj en la ĉefaj stacidomoj kaj grandaj uzinoj. Konstante eblas por eksterlandaj fervojistoj tranokti tie, sed en ĉiu lando la kondiĉoj estas malsamaj.

En ĉi tiuj landoj, kaj ankaŭ en Finnlando, Germanio kaj Svislando ekzistas fervojistaj feriaj domoj, kiuj estas troveblaj en konataj ripozejoj, apud maroj kaj riveroj, en montaroj, ĉe kuracbanejoj ktp. Ili akceptas ankaŭ eksterlandajn fervojistojn kun edzinoj. Bedaŭrinde ne ekzistas fervojistaj tranoktejoj kaj feriaj domoj en Belgio, Danio, Francio, Hispanio, Jugoslavio kaj Nederlando. Bulgario kaj Kroatio ne raportas pri tiu temo en la jarraporto.

12. Diversaĵoj

Aŭstrio: La Esperanto-movado en Aŭstrio ankoraŭ ne stagnas.

Belgio: Mankas kontaktoj kun la membraro, precipe kun nefervojista. Urĝe necesas reaperigi la dumonatan bultenon *Belga Fervojisto*.

Bulgario: La multjara ekonomia krizo en Bulgario okazigis malbonan influon rilate al la Esperanto-movado. La fervojistaj esperantistoj dum multaj jaroj ne ricevas financan helpon. Pro tio ili ofte ne povas partopreni en la IFEF-kongresoj. Multe da ĵunuloj ne havas laboron, kaj pro tio ili ne deziras membriĝi en Esperanto-organizo.

Ĉeĥio: Daŭras kunlaboro kun Esperanto-redakcio de Radio Vieno. Ili partoprenis karavane dum la Zamenhof-festo en Vieno.

La prezidanton de la landa asocio oni elektis *Sportisto de la jaro 1995 de regiono Pŕerov* en kategorio de veteranoj. Malgraŭ la aktivecoj la intereso por Esperanto en Ĉeĥio daŭre malkreskas pro nefacila ekonomia situacio.

Ĉinio: En la lastaj jaroj la Esperanto-movado en Ĉinio havas malfacilaĵojn. Tamen la movado daŭre donas riĉajn fruktojn, dank' al la klopodoj de esperantistoj. La fervojistaj esperantistoj aperigis artikolojn pri ĉina fervojo en ĉinaj kaj alilandaj gazetoj.

Danio: La ĝenerala Esperanto-movado en Danio ŝanĝis generacion. La estraro estas juna, kaj tio verŝajne havos pozitivan efikon por la movado. DEFA preparas similan ŝanĝon al nova generacio.

Francio: Same kiel ĉe la aliaj kulturflasantaj asocioj la Esperanto-movado stagnas. Ĉe FFEA la jaro 1995 estis mezbona, 66 novaj membroj, sed samtempe tro da membroj forlasis la asocion. Tamen la rezulto estis kontentiga rilate al kursoj kaj ekzamenoj, kiuj tre favore evoluis.

Finnlando: Post la morto de Matti Voltti (09.08. 1995) la nombro de membroj falis ĝis naŭ. Pro tio la landa asocio decidis ĉesi la asocion.

Germanio: Por kontraŭstiri la membroperdon GEFA evoluis ses okpaĝajn kajeretojn diverskarakterajn por varbado kaj informado pri la Esperanto-movado, kaj speciale pri la fervojista movado. Tiuj informoj ĝis nun alportas nur tre modestan rezulton.

Italio: Dum la jaro 1995 okazis multaj pri-kaj peresperantaj manifestacioj en kiuj IFEA-anoj vigle agadis aŭ kunlaboris. Generale rigardate en Italio ŝajne estas iom da evoluo, eble oni lasis la stagnon. Aperis multe da artikoloj, oni sukcesis okazigi manifestaciojn kaj radiodissendojn pri Esperanto kaj pri la lingva problemoj.

Hispanio: HEFA estas la plej aktiva kaj multnombra en la lando. Estas organizitaj kursoj por komencantoj kaj paroliga por progresantoj. Mankas junuloj. Tre populariĝis la monataj ekskursoj, kiujn partoprenas pli ol 50 klubanoj.

Hungario: Ĉiam pli malfacile povas varbi la landa asocio novajn membrojn, la mez-

nombra aĝo de la membraro altiĝas malgraŭ tio, ke la nombro de junuloj kreskas. La hungaraj fervojistaj esperantistoj rikoltis la frukton de la dujara fortostreĉa preparlaboro de la 47a IFK. Espereble la sukcesoj instigos la membraron ankau estonte evoluigi la movadon.

Japanio: Granda tertremo trafis la regionon Kansajo. Kun granda ĝojo ni informiĝis, ke neniu esperantisto mortis aŭ grave vundiĝis. La Esperanto-societoj de Kobe kaj Amagasaki, centro de la kataklismo, revivigis ekde junio siajn agadojn.

Jugoslavio: Ili festis duoblan jubileon: 70 jarojn post fondiĝo de la nunaj fervojistaj Esperanto-societoj kaj 40 jarojn post fondiĝo de JAFE. Tiukaze ili realigis abundan programon: aperis nacia vortaro, kurso en *Pruga*, dulingva artikolo en scienc-faka revuo *Železnice*.

Kroatio: Pro la malfavora ekonomia situacio en la lando la homoj estas okupataj pri aliaj intereso kaj ili ne havas sufiĉan tempon kaj monon por vojaĝi enlande aŭ eksterlande. Interalie pro tio la intereso pri Esperanto estas tro malgranda.

Nederlando: Dum la lasta jaro la situacio ĉe FERN restis fakte la sama. La plej multaj membroj estas maljunaj kaj ne plu povas helpi. Restas nur kelkaj, kiuj kelkfoje faras ion por FERN.

Norvegio: Dum sia jarkunveno Norvega Esperantista Ligo akceptis novan strategian planon. Ili esperas, ke ĝi povas revigligi la aktivecon de la Esperanto-movado en Norvegio.

Pollando: La kondiĉoj por Esperanto en Pollando kaj agado de la kluboj ne troviĝas en bona stato kaj daŭre malkreskas. Tamen estas inter la membroj malgranda grupo da esperantistoj, kiu agas tre vigle.

Rumanio: La situacio de la Esperanto-movado ne pliboniĝis kompare kun la pasinta jaro. Ŝanĝiĝis nur la intereso de samideanoj pri la movado. La fervojistaj esperantistoj esperas, ke en 1996 la situacio pliboniĝos, ili jam havas signojn.

Slovakio: Fervojista sekcio ĉe Slovaka Esperanto-Asocio estas registrita ĉe Ministerio de Enlandaj Aferoj de Slovaka Respubliko kiel civitana societo kun jura

memrajto sub la nomo Slovaka Asocio de Fervojistaj Esperantistoj. La malkresko de la anaro rilatas al la ŝanĝo de sekcio al asocio.

Slovenio: La situacio ne estas rozkolora, troa influo de angla kaj troa senlaboreco, kaj kun tio ligita ekonomia stato en kelkaj sociaj tavoloj. Ebleco de senpagaj vojaĝoj por aktivaj fervojistoj, kaj la fakto, ke en multaj lokoj troviĝas fervojistaj tranoktejoj donas eblecon al aktiva agado.

Svislando: Mankas junaj fortoj. La nuna estraro de la landa asocio havas multe da jaraĝoj, kaj la estraranoj ŝatus transdoni la gvidadon de la asocio en pli junajn manojn. Ĉi tiu situacio ne povos eterne daŭri, tio estas sendube klare al ĉiu. Oni povas timi, ke iam la svisa landa asocio ne plu estos funkcikapla.

13. Fina Komentario

Laŭ la raportoj de la landaj asocioj mi povas konstati:

- ▶ en Finnlando ĉesis la fervojista landa asocio,
- ▶ en Britio kaj Estonio la situacio estas maloportuna,
- ▶ en kelkaj landoj – Belgio, Nederlando, Svislando – tute mankas posteuloj, kiuj povus transpreni la taskojn en la kadro de la fervojista Esperanto-movado,
- ▶ en ĉiuj landoj mankas ĝejunuloj kaj maljuniĝas la fervojista Esperanto-mo-

vado,

- ▶ ĉefe en la iamaj socialismaj landoj – pro la malbona ekonomia, politika kaj socia situacio – malboniĝas la movada situacio,
- ▶ preskaŭ ĉiuj landoj havas malfacilaĵojn sur la tereno de okupiĝo de fervojistoj. Multaj fervojistoj perdas sian laborecon, kaj tiu situacio malhelpas al la Esperanto-movado,
- ▶ tamen la landaj asocioj ne perdas la esperon, kaj laŭ la eblecoj ili laboras per kaj por Esperanto,
- ▶ en la landoj, kie disvastiĝas la Esperanto-turismo la Esperanto-agado vigliĝas,
- ▶ ni havas grandajn rezultojn, ekz. ĉiujare ni organizas memstaran kongreson, inter la fakaj asocioj la fervojistoj havas la plej multnombrajn kaj aktivan federacion,
- ▶ sur la faka tereno ni produktis kaj daŭre produktas rezultojn, kiel la UIC-terminaro, la fakaj kalendaroj, la fakprelegoj, multe da fervojfakaj organoj, la lingvouzado – kiel oficiala laborlingvo – en la kadro de FISAIC ktp.

Tiuj rezultoj donu al ni esperon por la estonto! Tiuj rezultoj instigu nin al pli efika agado!

Budapest la 8an de majo 1996

István Gulyás
vicprezidanto de IFEF

Miliardaj investoj por ICE-linio

La Germana Fervojo (DB AG) fordonis nun komisionajn valorajn 3,6 miliardojn da germanaj markoj por la nova ICE-linio inter Frankfurt/M kaj Kolonjo.

La komision por la meza sektoro de la 135 km longa linio kun 35 km da tuneloj kaj 15 grandaj pontoj laŭlonge de la aŭtoŝoseo A 3 ricevis je samaj partoj kelkaj konsorcioj, el ili unu konsorcio de grandaj konstru-entreprenoj sub gvidado de firmao Philipp Holzmann, alia sub firmao de Augsburg-Walter-grupo, trian gvidos aŭstria-germana entreprengrupo. Aro da mezgrandaj entreprenoj ricevas komisionojn

por ĉirkaŭ 1,8 miliardoj da markoj.

La duan konstrusektoron oni komencos ankoraŭ en la kuranta jaro, la finkonstruon oni planas en la jaro 2000.

Laŭlonge de la linio inter Siegburg (proksima al Bonn) kaj la rivero Main oni krome konstruos du novajn ICE-staciojn.

Laŭ General-Anzeiger tradukis

Erhard HERLITZE



sumo pagenda estas pli ol 800 milionoj da guldenoj!

Sed kvankam ankoraŭ ne ekzistas eĉ unu kilometro da grandrapida linio, tamen ek de la 2a de junio pasinta la grandrapida trajno (baptita *Thalys*) veturas ĉiutage kvarfoje inter Amsterdamo kaj Parizo kaj reen. Dank' al la

grandrapida linio en norda Francio (Lille – Parizo) la vojaĝdaŭro reduktiĝis per 75 minutoj. Se la novaj linioj en Nederlando kaj Belgio estos pretaj en la jaro 2003 la vojaĝdaŭro Amsterdamo – Parizo reduktiĝos al 3 h 15 min.

Wim van Leeuwen

Tunelo sub aŭtoŝosea krucejo

Inter la 'aktualaĵoj' en IFK Den Haag estis prezentita la planita linio por grandaj rapidoj inter Köln [Keln] kaj Frankfurt, kiu fariĝos grava parto de la eŭropa grandrapida reto.

'Neŭralgia punkto' de tiu nova linio fariĝos la loko, kie ĝi devos subtere konduki sub la grandega aŭtoŝosea krucejo apud Frankfurt. La fervojaj inĝenieroj jam frue konstatis, ke ne eblis konstrui la linion trans super la kruc-ejon. Sekve ili planis tunelon kaj eĉ tiel, ke la ŝoseaj inĝenieroj samtempe povos pligrandigi la krucejon, kiu ne plu kapablas 'digesti' la nuntempan gigantan trafikon.

La subtera linioparto havos longon de 2,5 km, el kiuj 500 m estos kvartrakaj, 1400 m dutrakaj kaj 600 m unutrakaj. Estas interese, ke la plej granda parto de tiu tunelo ne estos

borata tra la grundo. Male, oni fosos grandegan fosojon, enkonstruos en ĝin la tunelon kaj poste kovros la tuton denove per tero. Kaj ĉio tio okazos ĝis profundeco de 30 metroj. Sole por kovri la tunelon oni bezonos 800.000 m³ da tero. Krome oni konstruos laŭ kutima maniero preskaŭ 300 m de la tunelo en formo de ovala tubo kun radiuso de sep metroj. Kontraŭ efiko de subtera akvo estos enkonstruataj 180.000 m³ da ŝtalbetono.

Pro la paralelaj planado kaj konstruado la giganta verko kostos 'nur' 215 milionojn da germanaj markoj. Jam en 1999 la unuaj ICE-trajnoj (InterCityEkspreso) traveturos la novan tunelon.

Laŭ *BahnZeit* 4/96 Giessner

Rolf Bergh 75jara

La 10an de oktobro Rolf Bergh, prezidanto de NEFA (Norvega Esperantista Fervojista Asocio) kaj komitatano de IFEF por NEFA, fariĝos 75jara.

Dum la jaroj, kiam li estas esperantisto, li en ĉiuj medioj montras eksterordinaran aktivecon kaj dinamikon, kaj ĉie kie li agadis sekvis pozitivaj rezultoj.

Plej menciinda estas lia giganta laboro dum la 42a IFK en Hamar en 1990, kiam li iniciatis senpagan restadon por la gekongresanoj el nepagipovaj landoj.

Nuntempe li partoprenas en kvarpersona laborgrupo pri ellaborado de fervojfaka vortaro.

Rolf Bergh tre multe faris por aranĝi kURSOjn por komencantoj, precipe per la lokaj

radioelsendejoj vaste en Norvegio. Li estis kaj daŭre estas estrarano en Legaco Rolf Uhlen por akcelo de la Esperanto-movado en Norvegio.

Nuntempe li estas en la estraro de la societo *Eldonejo Esperanto*.

Li kompreneble estas aktiva kaj fervora membro de la Esperanto-klubo *La Urso* en sia hejmurbo Sarpsborg, kaj kiam Norvega Esperantista Ligo en 1993 aranĝis sian landan kongreson Rolf Bergh estis taŭga organizanto.

Ankaŭ en la orientnorvega distrikto de NEL li estas aktiva. Pro ĉio li dum la landa kongreso 1993 nomigis 'Kavaliro de la Ordeno *Pro Merito*'.

Ni, liaj samideanoj kaj gekolegoj, sincere gratulas kaj deziras por li multajn bonajn jarojn.

Per Johan Krogstie

Du vizitoj en sudorienta Eŭropa

Valoris preni sur sin la malfacilaĵojn de tiuj longaj vojaĝoj, kaj mi raportu pri ili. Praktike estis du vojaĝoj, el kiuj la unua gvidis al Rumanio, pli ekzakte al la jarkunveno de la rumana IFEF-asocio REFA. Ĝi okazis en Targu Mures, urbo kun pli ol 200.000 enloĝantoj en okcidenta regiono, kie kunvivas rumanoj, hungaroj kaj germanlingvanoj. Sekve la urbo havas krom Targu Mures la nomojn Morosvasarhely kaj Neumarkt. Ĝi fakte estis dum jarcentoj merkaturbo ('markt' = merkato).

Partoprenis en tiu kunveno ĉirkaŭ cent personoj el tuta Rumanio kaj ankaŭ el kelkaj aliaj landoj. Ĉeestis krom la estraro de REFA sub gvido de ties prezidanto M. Stefan inter alie la ĝeneralaj direktoroj el Braŝov, Galati kaj Iasi. La ministro por transporto A. Novak patronis la kunvenon. El la raportoj donitaj en la oficiala kunveno oni povis ekkoni, ke REFA pozitive evoluas. Oni anoncis 232 membrojn, inter ili ĉirkaŭ 60 gejunulojn. Menciinda estas la fervojista horo *Feroviaria* el Cluj, kiu ĝojigis per belvoĉa kantado, parte en Esperanto. Delegacio estis akceptita en la distrikta prefektejo, sub kies regado estas 4 urboj kaj 90 vilaĝoj. La cetera programo enhavis festan vesperon kun – kiel bedaŭrinde nun kutime – bruega muziko malhelpanta babildon. Entute la tritaga kunveno suferis pro aĉa vetero kun seninterrompa pluvo kaj temperaturo inter kvin kaj dek gradoj. La regiona radio raportis pri la kunveno kaj ankaŭ intervjuis Radio Bukareŝto, kiu sendas al la tuta lando.



Post akcepto ĉe la prefekto de Targu Mures

Sekvis vojaĝo kun estrarano de Rumana Esperanto-Asocio al Bukareŝto, dum kiu mi povis observi la ne tro gloran staton de la fervojo kaj ĝian funkciadon. Karakterizaj estas plenplenaj trajnoj, kiujn oni prefere ne uzu sen rezervita sidloko. Kaj nepre oni havu kun si enlandan esperantiston, kiu povas laŭbezone helpi. Dufoje ni devis interrilati kun la konduktoro, ĉar kvankam ni havis rezervitajn sidlokbiletojn, la sidlokoj estis okupitaj, tiel ke ni ricevis lokojn en alia kupeo, kiujn ni poste denove devis ŝanĝi.

Iom da restado en Bukareŝto donis impresojn pri multaj detaloj de la nuna stato en tiu ĉefurbo. La sumo de tiuj detaloj kaj de la aldonaj informoj buŝaj substrekiis, ke multe da penado necesas por majstri la ĉiutagan vivon.

Preskaŭ tri horojn ni bezonis por akiri simplan bileton por veturado de Bukareŝto al Sofia kaj reen inkluzive de sidlokbileto. Ne eblis aĉeti ilin en la ĉefstacio. Necesis veturado per metroo al la centro de la urbo al iu agentejo, kiun sen helpo de akompananto mi neniam estus trovinta. Oni sentas sin ĝoje kontenta, kiam fine oni havas en poŝo la biletojn.

La internacia trajno al Sofia estis denove plenplena precipe de junuloj, kiuj ĉiuj eltrajniĝis en la bulgara limstacio Ruse. Evidentiĝis, ke en ambaŭ direktoj la doganistoj, do la ŝtato, atribuis grandan signifon al la vizo, pli klare al pago por ĝi. Ne havante bulgaran vizon, mi akiris ĝin por 135 DEM. La rumanoj dum la reveturado estis pli modestaj, postulis nur 34 DEM.

En Ruse atendis prezidanto Stefan de REFA, kaj ni komune daŭrigis. La vetero fine plibonigis kaj revenis somera varmeco. Kun pli ol du horoj da malfruigo ni alvenis en Sofia, kie atendis la prezidantino de la bulgara IFEF-asocio, s-ino P. Lalova, kun kelkaj membroj. Fariĝis emocia revido, ĉar mi ne estis tie de post 1984. Ankaŭ la direktorino de la Bulgara Esperanto-Teatro B. Beleva ĉeestis, konata el la IFK okazintaj en Bulgario. Ne okazis oficiala programo, ĉar la bulgaraj kolegoj nur unu fojon monate dum kelkaj horoj rajtas uzi fervojan ejon. Por fari ion alian

mankas mono. Kun malagrablaj sentoj mi devis ekkoni la nekredeble malfacilajn vivkondiĉojn, ekz. la malaltegajn salajrojn (inter 25 kaj 30 dolaroj monate) kaj rentojn, evidente la plej malbonajn en tuta Eŭropo. Oni apenaŭ povas imagi, kiamaniere tiuj homoj konservas elteneblan vivnivelon.

Ne estas mirige, ke sub tiaj kondiĉoj ankaŭ la intereso por Esperanto suferas, tiel ke post la neforgeseblaj kongresoj de Ora Sablo kaj Slanĉev Brjag la bulgara asocio forte devas barakti por travivi la nunan situacion. Sed io, kio ne ĉesis, estas ilia gastamo, kiu donas varman senton. Kaj oni tamen esperu, ke kelkaj el ili povos partopreni en la venonta IFK en Košice. La ĉeesto kun mi de la rumana prezidanto espereble havos pozitivajn konsekvencojn por la najbaraj rilatoj inter la du asocioj.

Instrua ankaŭ estis la revido kun la bulgara

ĉefurbo, kiun mi parte travagis piede, sed ankaŭ kelkfoje per tramo kaj sufiĉe kadukaj taksioj. Ĉie, kien oni rigardas, oni devas konstati, ke mankas rimedoj por ordigi plej necesajn aferojn, ĉu domojn, stratpavimon, fervojajn veturilojn aŭ prizorgadon de rubaĵoj.

La revojaĝon al Bukareŝto mi faris sen akompananto en la sola dumtaga trajno inter la du ĉefurboj, ĉi-foje en bulgara vagono. Kompreneble la okuloj de fervojisto observas multon kaj la rezulto estis sama kiel en rumanaj vagonoj. Necesas abundaj investoj por alproksimigi la ekipaĵojn de la du fervojoj al tuteŭropa nivelo. Kaj tio certe eblos nur, kiam la ĝenerala vivnivelo konsiderinde plialtiĝos, kaj la homoj rigardas la bonordan staton de la vagonoj kiel ion normalan.

Mi deziras fini tiun ĉi raporton kun danko al miaj rumanaj kaj bulgaraj amikoj, kies helpo kaj gastamo entute ebligis al mi tiun vojaĝon.

J. Giessner

Jubilea jarkunveno de GEFA

Germanaj fervojistaj esperantistoj okazigis sian jarkunvenon (04.-06.1996) en Alexisbad fondita antaŭ du jarcentoj kiel kuraĉloko en la Harc-montaro. 80 membroj kaj amikoj pasigis agrablan semajnfino en eleganta hotelo. Kulmino de la aranĝo estis la festvespero. S-ro Giessner, prezidanto de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), donis resumon de la jarraporto, kiu bedaŭrinde ne prezentis pozitivan situacion. Li petis la kunvenintojn ne ĉesi en la kunlaboro malgraŭ ĝenerala indiferecenteco kaj malfacilaĵoj deposed la privatigo de la fervojo. S-ro Petzold, ĉefestrarano de la Fervoja Sociala Organizaĵo (BSW), laŭdis la aktivecojn de la membroj. Al la prezidanto li transdonis premion pro liaj multflankaj meritoj. Nome de eksterlandaj asocioj transdonis salutojn s-ino Deloyer (Belgio), s-ino Mateeva (Bulgario) kaj s-ro Marcu (Rumanio). Fervojista orkestro de harmonikoludantoj rikoltis fortan aplaŭdon per siaj gajaj muzikaĵoj. Poste oni dancis ĝis noktomezo.

Dum la dimanĉa matineo videblis diafotografioj pri pasintaj kongresoj kaj kunvenoj. Ĉarmaj kantistinoj finis la memorojn per viglaj popolkantoj.

Ne mankis turismaj ofertoj. Per etŝpura nostalgiala vaportrajno grupo vojaĝis al la urbo Harzgerode. Sabaton, post komuna tagmanĝo, aŭtobusa ekskurso kondukis tra romantika valo al la malnova Hanso-urbo Quedlinburg. Lerta gvidantino klarigis la historion de la urbocentro. Promenante en la mezepoka urbo kun multnombraj faktabaj domoj la ekskursantoj ĝuis sur la kastelmonto mirindan panoramon. Tie, antaŭ pli ol mil jaroj, estis elektita la unua germana reĝo. Post tiom da kulturaj impresoj bone gustis kafo kaj kuko en mezepoka restoracio. Ne necesa mencii, ke sunbrila vetero akompanis la jubilean jarkunvenon. Kun danko al ĉiuj organizantoj oni adiaŭis. Ĝis revido venontjare. En la bavara urbo Aschaffenburg okazos la 41a jarkunveno de GEFA inter la 10a kaj 12a de oktobro 1997.

W. Barnickel (DE)

Aziaj fervojistoj kunsidis en Shanghai

La 24an de aŭgusto ĉi-jare kunsidis 35 aziaj fervojistoj de Ĉinio, Japanio, Koreio, Vjetnamio, Germanio kaj aliaj landoj en la hotelo *Silka Vojo* de Shanghai, Ĉinio, dum la 1a Azia Kongreso de Esperanto por okazigi fakkunsidon de la kongreso kaj jarkunsidon de Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio (ĈFEA).

La kunsidon prezidis s-ro Xiao Ke, ĝenerala sekretario de ĈFEA. Unue li voĉlegis gratulvortojn de la prezidanto de UEA s-ro Lee Chong-Yeong: 'Fervojo estas ligilo de popoloj same kiel Esperanto estas ligilo de popoloj. En tiu senco internacia fervojisto povas kontribui multe por la disvastigo de nia lingvo kaj ideo'. La gratulvortoj estis bonvenigitaj de la fervojistoj per varma aplaŭdo.

Poste la vicprezidanto de ĈFEA s-ro Han Zuwu faris raporton *Aziaj fervojoj de la 21a jarcento*. Germana fervojisto s-ro Heinz Schindler raportis pri la Esperanto-movado de germanaj fervojoj kaj la kongreso de IFEF.

Japanaj fervojistoj s-roj Nobuki Naosuke kaj Sibata Akira raportis pri novaĵoj de japanaj fervojoj kaj la Songlinio galaksia. Fine la prezidanto de ĈFEA s-ro Li Sen faris prelegon *21a jarcento kaj ĉina fervojo*. La raportoj kaj prelegoj interesis ĉiujn kunvenantojn. Aliaj fervojistoj aktive diskutis pri fervojoj en la 21a jarcento kaj la Esperanto-movado de fervoja fako en diversaj landoj.

Ankaŭ raportistoj de *Ĉina Radio Internacia* kaj *El Popola Ĉinio* ĉeestis la kunsidon. Ĉiuj ĉeestantoj opiniis, ke la renkontiĝo inter aziaj diverslandaj fervojistoj en Shanghai donis bonan ŝancon por influi kaj akceli disvastigon de la aziaj fervojoj kaj la fervoja E-movado en Azio. Ili esprimis ankaŭ volon fortigi la kontakton kaj kunlaboron de fervojaj kolegoj de diverslandoj en Azio en la venonta 21a jarcento.

Han Zuwu, vicprezidanto de ĈFEA

Estrara kunsido

En la tagoj 8a-15a de septembro la itala liber-tempa organizo Dopolavoro Ferroviario organizis kulturen semajnon en la Dolomitoj, kie ĝi havas restadejon. La IFEF-sekretario, d-ro Romano Bolognesi, aranĝis, ke la tuta IFEF-estraro kaj la ĉefkomitatano povis partopreni tiun aranĝon kaj samtempe havi estraran kunsidon. Dum la periodo okazis diversaj ekskursoj kaj vespere okazis prelegoj ekz. pri astrologio, arkeologio, fotado kaj pri Esperanto-literaturo itallingve prelegis s-ino Perla Martinelli. D-ro Bolognesi instruis Esperanton dufoje. Kelkaj ofertoj okazis ekster la domo, ekzemple granda koncerto kun orkestro kaj ĥoro en grandega sporta halo, kiu estis plenplena, homoj eĉ sidis sur la planko. Alia vespero estis folkloro vespero en la kultura domo de la urbo, tre interesa kaj tre lertaj kantistoj kaj dancistoj.

Ĉiuj vespere la astrologoj starigis teleskopon ekster la domo, kaj ĉiuj havis eblecon rigardi la diversajn planetojn. La lastan tagon d-ro Bolognesi veturigis la estraron al la montaro kaj ni



de du el la pasejoj povis ĝui la belajn pejzaĝojn. Neforgeseblajn tagojn ni travivis en la Dolomitoj, sed ni ne forgesu, ke ni venis tien ĉefe por labori, kaj ni vere laboris. Por la unua fojo ni havis sufiĉe da tempo por profunde pritrakti kaj turni ĉiujn problemojn. Bedaŭrinde ni ne solvis ĉiujn, sed ni solvis kelkajn kaj kreis bonan bazon por plua traktado de la nesolvitaj. Koran dankon al ĉiuj italaj kolegoj diversbrancaj por tre agrabla restado en la bela regiono.

□

FISAIC: Invito al Film- kaj Videokonkurso

Dum la tagoj 18.-21.10.1997 la Ĉeĥa landa sekcio de FISAIC ĉe ĈD en Brno aranĝos la 17an Internacian Konkurson Filmo kaj Video. Same kiel antaŭ kvar jaroj la organizan flankon transprenis (laŭ kontrakto kun Ĝenerala direkcio de ĈD) Kongresa kaj Kleriga Entrepeno KAVA-PECH, gvidata de Petro Chrdle, la inicianto de la membriĝo de ĈD al FISAIC kaj iama FISAIC-vicprezidanto. Krom la projekciado estas preparitaj riĉaj turisma kaj kultura programoj: antaŭ la konkurso en Prago kaj post la konkurso en Suda Bohemio, sed ankaŭ dum la projekciado en Brno, precipe por la akompanantaj personoj. Eblas aliĝi al ĉiu de la tri programoj (Prago, Brno, Suda Bohemio) memstare.

Por ni esperantistoj estas grave, ke la laborlingvoj de FISAIC estas krom tradiciaj la franca kaj la germana ankaŭ Esperanto. Kvankam la antaŭajn konkursojn neniam partoprenis filmo en Esperanto, nek partoprenanto indikanta Esperanton kiel sian laborlingvon, mi esperas, ke tio ŝanĝiĝu. Tial mi vokas ĉiujn filmantajn esperantistojn fervojistojn pripensi sian partoprenon en la konkurso. Ni montru, ke Esperanto estas vere egalpotenca lingvo kun la lingvoj naciaj. Jen la programo:

Prago 15.-18.10.1997: Promenoj tra historia kerno de Prago, vizito de Praga Kastelo, Strahov-monaĥejo, Nacia Teknika Muzeo, koncerto, sed ankaŭ bierumado en la plej fama praga bierejo U kalicha. Komuna forveturo al Brno per IC-trajno.

Brno 18.-21.10.1997: Krom projekciado ĉiuj ĝuos la folkloron en burĝa vinejo Špilberk, vizito konatajn batalejojn kaj kastelon Slavkov (Austerlitz) kaj ĝuos la adiaŭan vesperon kun transdono de premioj kaj danco. La akompanantaj personoj krome promenos tra historia kerno de Brno kaj vizitos Moravian Karston.

Suda Bohemio 21.-24.10.1997: Forveturo de Brno per ekskursiva aŭtobuso, survoje vizito de vidindaj lokoj Třebíč, Telč (konservita urba kerno protektita far UNESCO), Jindřichův Hradec, Třeboň. Sekvantaj tagoj trarigardo de České Budějovice (centro de Suda Bohemio), Český Krumlov, kastelo Hluboká kaj la ĉasista kastelo Ohrada (ekspozicio de ĉasado kaj laga fiŝbredado), tie ĝuo de la sudbohemia folkloro.

Perbusa vojaĝo al Prago, survoje vizito de ekspozicio de animita filmoarto en la kastelo Křatochvile. Atingo de Prago antaŭ la 15a horo kun haltoj ĉe ambaŭ internaciaj stacidomoj en Prago (Prago hl.n. kaj Praha-Holešovice).

Pli da informoj kaj aliĝilojn vi ricevos de: Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobruška. Tel +42 29912201, fakso +42 2991 2126 retadreso (E-mail): chrdle@kava-pech.cz



Rememore al la konkurso en 1993 en Prago (pli ol 80 partoprenantoj, 64 konkursoj filmoj de sep landoj: Sur la foto kunsidas la Teknika Komisiono de FISAIC por filmo kaj video (foto: Petro Chrdle)

Forpasoj

Emerita staciestro **Olaf NYBERG**, naskita 28.01.1928 mortis la 21an de aŭgusto 1996 en sia hejmo en Åndalsnes.

Olaf Nyberg estis esperantisto dum multaj jaroj, kaj li estis aktiva membro de Norvega Esperantista Fervojista Asocio. Paco estu je lia memoro.

Emerita fervojisto **Odd Magnus Rennemo** forpasis en Hamar, Norvegio, sabate la 12an de oktobro, en la aĝo de 73 jaroj. Li estis multjara kaj fidela ano de la fervojista Esperanto-movado kaj ankaŭ de *La Norda Stelo*, la urba klubo de Hamar.

Ni liaj gesamideanoj funebras kaj esprimas: Li ripozu en paco.

Per Johan Krogstie

Esperanto-parto de urba muzeo en Česká Třebová

Antaŭ pli ol unu jarcento en Česká Třebová, instruisto Jan TYKAC ekstarigis muzeon en iama lerneja klasĉambro. La celo estis, ne nur konservi kaj ekspozicii ilojn kaj dokumentojn rilate al multnombraj kamparanoj, sed ankaŭ montri la nuntempan vivon de rapide disvolvigita fervojistaro en grava fervojnodo: Česká Třebová.

Post multaj lokŝanĝoj, jaroj de sukceso kaj malsukceso, alvenis jaro 1985. Post la dua mondmilito kaj la plua periodo estis multaj muzeaj historiaĵoj detruitaj kaj la urba muzeo devis dediĉi multe da tempo al renovigo de muzeajoj. Tiutempe transprenis la taskon gvidi la lokan muzeon Jiří PIŠTORA, plej konata de la jaro 1960 en la esperanta movado. Li daŭrigis la antaŭan taskon kaj plie ekkolektis ĉion rilatantan al Esperanto en la regiona E-movado kaj pli malfrue el bohemia, moravia kaj silezia regionoj. En la jaro 1992 samideano Pištora ricevis permeson de la urba konsilantaro oficiale fondi E-parton de loka muzeo. Li povas dediĉi pli da loko por esperantaĵoj en ekskazernejoj de soveta armeo forlasinta la regionon, kie

nun troviĝas deponejo de la muzeo. Nuntempe oni senpacience atendas ricevon de aparta domo en la centro de la urbo por ekspozicii la interesan havaĵon de la muzeo.

Kompreneble ne eblas eltiri nur lokan historion el la historio de la tutmonda Esperantomovado. Eble ie troviĝas inter la esperantistaro interesaj pri la Esperanto-movado en Ĉeĥa Respubliko, kiuj povus riĉigi la E-parton de la muzeo en Česká Třebová. Bonvolu kontakti s-ro Pištora, kiu ankaŭ invitas vin por viziti la muzeon. Lia adreso:

Jiří PIŠTORA,
Nové náměstí 1746,
CZ-560 03 Česká Třebová.

Telefonnumeroj:
hejme: +42 465 3129
muzea oficejo: +42 465 4216
deponejo: +42 465 539 170

Jean RIPOCHE (al mia bonega amiko Jiří)

Al la landaj asocioj de IFEF

Uniformprezentado dum la 49a IFK

Uniformprezentado dum la 49a IFK estas dezirinda. Pro tio mi petas, ke oni en la opaj landaj asocioj de IFEF pritraktu la aferon, kaj mi petas respondon al jenaj demandoj:

1. Ĉu vi en via asocio estas preta partopreni en la planita uniformprezentado? jes ☐ ne ☐
2. Kaze de pozitiva sintendo: Kia(j) uniformo(j) estos prezentata(j) (el kiuj branĉoj de la fervoja servo)? Respondo:
3. Pri la uniformvestita(j) persono(j):

nomo	plena adreso	speco de uniformo

Via repondo estas necesa antaŭ 15.12.1996.

Per Johan Krogstie, Karudveien 1 – P.B.126, NO-2341 Løten. Tel/fakso +47 62 59 06 95

INTERNACIA FERVOJISTO
1996.6
48a eldonjaro

Dumonata fervojfaka
revuo en Esperanto
kaj organo de
Internacia Fervoĵista
Esperanto-Federacio.

Redakcio:
Erna Hauge,
Banegårdspladsen 14,
DK-9700 Brønderslev.
Tel + fakso +45 98 80 15 99.

**INTERNACIA FERVOJISTA
ESPERANTO-FEDERACIO**

Sekretario:
D-ro Romano Bolognesi,
Via Misa 4,
I-40139 Bologna.

Kasisto:
Henning Hauge,
Banegårdspladsen 14,
DK-9700 Brønderslev.
Tel + fakso 45 98 80 15 99.

Dana poŝteĉkonto:
1 25 80 36, IFEF,
Banegårdspladsen 14,
DK-9700 Brønderslev
(pagante per poŝteĉ-
konto el eksterlando
aldonu 15 DKK por
poŝtelspezoj).

Dana bankkonto:
3717 034856, Den Danske
Bank, DK-9800 Hjørring
(pagante per bankkonto
aldonu 25 DKK por bank-
elspezoj).

Svisa bankkonto:
471-02, Thurgauische
Kantonalbank,
CH 8590 Romanshorn.

Svisa poŝteĉkonto:
CH 85-4110-5
Frauenfeld, IFEF,
Banegårdspladsen 14,
DK-9700 Brønderslev.

Redaktifino por la ven-
onta IF, kiu aperos meze
de januaro: 15.12.1996.

Presejo:
Geffon Tryk Næstved A/S

Ĉirkaŭ la teron 2500foje

Lunde la 24an de junio 1996 la IC3-trajnunuoj de DSB (Danaj Ŝtatfervojoj) veturis entute 100 milionojn da kilometroj. Tio egallas 2500 fojojn ĉirkaŭ la teron ĉe ekvatoro. La unua trajnunuo ektrafikis en januaro 1990, kaj hodiaŭ DSB havas 85 IC3-trajnunuojn. 10 unuojn oni uzas en la internacia trafiko inter Kopenhago kaj Hamburgo (DE).


Multaj el la trajnunuoj jam trapasis grandan planitan teknikan ekzamenadon je 1,2 milionoj da km. Lige al ĝi la vagonoj ricevis novajn seĝojn, novajn flortapiŝojn kaj vastan renovigon de la cetera ekipaĵo en la vagonoj.

Alta produktiveco

Lige al la teknika renovigo oni aldonis al la trajnunuoj vicon da novaj teknikaj komponentoj, kiuj plifortigas la ekspluatadstabilon. IC3 estas ne nur la plej produktiva trajno de DSB, ĝi estas ankaŭ inter tiuj trajnoj en la tuta mondo, kiuj veturas plej multajn kilometrojn jare.

Ankoraŭ kvar IC3-trajnunuojn oni mendis ĉe ADtranz en Randers, kiu sub alia nomo konstruis ĉiujn IC3-trajnojn. Ĉi tiuj trajnoj estos liverataj ĉe la jarŝanĝo 1996-97 kaj devas veturi kiel 'fulmo'-trajnoj laŭ la firma interligo trans Storebælt.

El Perron P n-ro 14/aŭgusto 1996



Fervoja Koresponda Servo

S-ro PORUPKA Sorin, Mihai Bravu 32/2, RO-6200 Galati

Se vi deziras utiligi la servon, bonvolu indiki viajn nomon, aĝon, adreson, en kiuj landoj vi deziras korespondant(in)on, kaj pri kiaj temoj ktp.

Aldonu se eble internacian respondkuponon. Se tio ne eblas, aldonu poŝtmarkojn vendeblajn en Rumanio.